



NORDHUNGARIA INFORMO

*Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc*

Marto - aprilo 2010-a

5-a jarkolekto n-ro 55-56.

Enhavo

2010.....	3
Ĉu meteorito transflugis super Norda-Hungarujo?	3
Marto 9	3
Rememoro	4
Grafo István Széchenyi	5
2010, estas Jaro de Pastroj.....	7
Ermito de nia epoko	7
Tago de la Poezio en Hungarujo	9
LULKANTO	10
Ottó Herman.....	11
La Muzeo „Herman Ottó” en Miskolc	12
Ŝercoj.....	14
Internacia leterkesto - novaĵoj	15
Pollando - Esperantistoj en la pola parlamentejo	15
POLA SEJMO (PARLAMENTO).....	16
„Ŝipkrozado ĉirkaŭ Aŭstralio kun Papuo Nova Gvineo.....	17
Japanujo - Virintago 2010a	18
Italujo – Triest - La 4a Internacia Konkurso – en la jaro 2010-a.....	19
Brazilio	21
Albanio	22
Kaj ili pravis. Kiun paron (x ; y) ili jam trovis?.....	22
Nota: Nur unu paro (x ;y) koincidas al ilia dialogo!.....	22
Ĉeĥujo	23
Esperanta kato	23
Aŭstralio	23
Usono-Hungario	23
Ran-kvarteto	23
Rumanio – Oradea.....	24
Ni funebras	26
D-ro Ferenc Jáki	26
Ferenc Jáki: Paradoksoj.....	28
Mortis Klara Mikola naskito de Norda-Hungarujo	28
Pasko	31
Dia helpo	31
Vi amas la printempon	31

2010

Karaj niaj legantoj!

La jaro 2010a estas Jaro de la Pastroj, la 3a numero, la Biodiverseco, la Alproksimiĝo de Kulturoj, la Junularo, la Luktoj kontraŭ Malriĉeco kaj Sociaj Ekskludoj. la planedo Merkuro, la Tigro. Ni havas ankaŭ gravajn datrevenojn de famaj homoj. Ekzemple de F. Chopin (200a jardatreveno de lia naskiĝo), de Ferenc Erkel (200a jardatreveno de lia naskiĝo), Ottó Herman (175a jardatreveno de lia naskiĝo). Memorinda estos ankaŭ la 240 jara ferfabriko de Miskolc-Diósgyőr. Ni rememoros pri ili, sed ankaŭ kromaj interesaĵoj atendas niajn karajn legantojn.

s-ino Adrienne Pásztor

Ĉu meteorito transflugis super Norda-Hungarujo?

Nokte, la 28an de februaro 2010a, ardanta fajroglobo kuregis sur ĉielo de Norda-Hungarujo. Ĝia vidaĵo kaj la aŭdeblaj eksplodegoj timigis la nedormantan loĝantaron. Ĝi aperis blanke ardanta fajrobulo, kiu aŭdigis kelke da detonacioj pro kiuj la aĵo ŝajnis defali, surterenfali je milionoj da pecoj. Sed vane serĉas ties pecetojn la esploristoj kaj membroj de la Kontraŭkatastrofa-entrepreno. Tiuj pecoj de la 10 000 metra supero kureginta aĵo, troveblas nek en Hungario, Slovakio, Ukraino. Oni parolas ankaŭ pri tio, ke ĝi ne povis esti meteorologia objekto aŭ meteorito, ĉar la lasta estas ruĝkolora. Unuj opinias, ke tiu povis esti iu gasbulo, kiu faris tiujn detonaci-voĉojn, poste malaperis en nia aero, pro kaj post ĉesiĝo de sia lumo. Kelkaj homoj opinias, ke ĝi povis esti spacveturilo el la spaco, sed neniu scias tamen kio ĝi estis, de kie venis kaj kien iris. Ni pensas, nur tiam ni scios pli multe pri la spektaklo, se oni trovos ĝiajn pecojn, kies traesploro rezultos la pliriĉiĝon de nia scienca literaturo.

s-ino Adrienne Pásztor



Marto 9

La 9an de marto 2010a okazis inaŭguro de fotoekspozicio en Miskolc. En la Junulara kaj Libertempo-Domo donis lokon al ekspozicio de fotistaj raportistoj de parte lokaj gazetoj. Ili estis: János Ádám (de taggazeto Észak-Magyarország), Ákos Juhász (Miškolc-a semajna gazeto MINAP), János Vajda (MTI) kaj Csaba Végh (Kulcs Magazin). La ekspozicion inaŭguris: d-ro István Dobrossy: pensiuligita direktoro de la urba Arĥivejo. Kunagantoj estis:

sinoj Silvia Ceglédi kaj Orsolya Balogh per flutoj. La ekspoziciitaj fotoj pruvis la fakan scion de la junaj fotoraportistoj.

S-ino Adri Pásztor



sinjoro Ištván Dobrossy



Kelkaj el la ekspoziciitaj bildoj.

Rememoro

Niaj karaj legantoj bone scias, ke nia nuno kaj estonto baziĝas sur nia pasinto. Unuj kredas kaj bone kredas, ke ni devas ekzemplon preni el agoj de la multŝancojn provantaj prauloj kiuj havis grandajn praktikajn sentemojn. Kelkaj homoj forton volas ĉerpi de la antaŭuloj, dirante, se ili kapablis tiome multe agi por intereso de siaj homfratoj, kial ni ne povas same fari, aŭ eĉ pli? Mi proponas nun, ke dum nia Miŝkolc-a promenado, haltu ni iom ĉe fino de la strato Széchenyi antaŭ la pri li figurita skulptaĵo, kaj rememoru pri lia grandioza individuo. Tiun ĉi skulptaĵon ni Miŝkolc-anoj ne tre ŝatas, ĉar ĝi montras ne la energian, bonaspektan junan viron Széchenyi, sed la maljunan sortobatatan malsanan homon. Kial donis la urbo mendon por prezenti la grandan individuon de nia historio tiu-ĉi aspekta, kaj ne junaspekte aperanta? – ni demandis jam dum la inaŭguro de la statuo, kaj demandas ankaŭ hodiaŭ. Eble ni povus klarigi tiun agon per tiu fakto, ke la ĉefnobelulo monarko-fidela je sia maljuna aĝo rekonis, ke pro la subevoluinta stato de sia patrujo, nun sole nur la aŭstra Habsburga- kortego

respondecas. Kial oni nomas grafon István Széchenyi (Ištvan Seĉenji): „La plej granda Hungaro”? Vi ekscios, se la sekvan rememoron vi finlegos.



Grafo István Széchenyi june

Grafo István Széchenyi

En la 20aj jaroj de la 19a jc. jam ĉiutere de la hungara vivo komenciĝis la iniciatoj por plirapidigi la evoluon de la kultura, socia kaj ekonomia vivo. Daŭre pli kaj pli multe da homoj komencis urĝigi la sendependiĝon de la reganta Aŭstra kortego, kio nur eluzis la regatajn landojn, sed ne prizorgis, plie baris ties kontinuan evoluigon. Rekonante la jam urĝigan neceson, per la disvastiĝo de la hungarlingva literaturo ekkomenciĝis la evoluo, kio fortigis la nacian memkonscion.

Ĉiuj scias, ke granda evolumalhela faktoro estis la situacio de la servutularo vivanta el la agrikulturado, pro sia servutlaboro, - la nobelara prerogativo: ĉar la liberan vendadon de la nobelaj terbienoj baris la tn:” leĝo pri la praa posedo ”, pro kio la terposedantoj ne povis ricevi kreditmonon por evoluigi siajn terbienojn. La reformatoroj unue volis krei la socian ekvilibron per la plibonigo de situacio de la servutularo, poste antaŭeniĝis demandoj pri pretendoj de la evoluigo de komerco, industrio kaj elkonstruo de la trafikado. Ja tiam en Hungarujo la plibonŝanculoj vojaĝis de diliĝenco, aliaj kunĉevale, la varportado okazis per ĉaroj trenataj de bovoj. En tiun-ĉi epokon naskiĝis la aristokrata grafo István Széchenyi. Lia patro estis grafo Ferenc Széchenyi, fondinto de la Hungara Nacia Muzeo. Lia patrino estis Julianna Festetics, filino de grafo Georgo Feštetiĉ kiu fondis la agrikulturan lernejon “Georgikon”.

Nun, je la 150. jara datreveno de morto de grafo István Széchenyi, ni rememoras pri la granda ŝtatviro.

István Széchenyi naskiĝis en Vieno, la 21an de septembro en 1791. Li frue ekinteresiĝis pri la kulturo, heredante ties ŝaton, interesiĝon pri la popolo kune kun la forta socia sentemo. En la jaro 1808a li soldatiĝis, kaj kun sia armeo li partoprenis multajn militirojn. Dume li ofte vojaĝis, lingvojn lernis, multe legis. Dum siaj vojaĝoj li kontentigis sian larĝskalan interes-

rondon. Ekzemple en Anglujo li studis la konstitucion, socian vivon, ĉevalbredadon. Li vizitis krom Anglio: Francujon, Germanujon, Italion, sed ankaŭ Malgrandan-Azion. Dum siaj vojaĝoj li povis sperti la grandan subevoluitecon de sia patrujo kompare kun la vizititaj landoj. Post lia hejmenalveno li ekverkis siajn librojn kaj fondis diversajn societojn. En 1822 li enhejmigis la Vetkuradon de ĉevaloj en Budapeŝto – laŭ la angla ekzemplo. En 1825 li fondis la unuan Ĉevalbredan-Asocion. Dum la 1825a jaro ekfunkcia Parlamento-kunsido, li oferproponis sian unujaran enspezon, kaj per tiu ago li certigis la kreiĝon de la Hungara Scienca Akademio. En 1826 li rezignis pri sia armeo-oficira rango, por sendependigi de tio siajn reformajn planojn. En 1827, li fondis La Nacian Kasinon tiucele, ke li povu antaŭhelpi la nacibazan politikan deklaron de la starpunktoj de la tie kolektiĝantaj aristokratoj. En 1830 li eldonis sian unuan libron, titolitan: HITEL (Kredito), en 1831 li eldonis sian duan libron titolitan: STÁDIUM (Stato). En ili li priskribis siajn reformcelojn Li urĝigis krei leĝon pri juro de la kamparanaro pri la libera terbienĉetado. En kaŝita formo, sed jam ĉeestis la pensoj pri la egalrajteco kaj la komuna pago la sociaj monŝarĝoj. Al lia nomo ligiĝas ankaŭ la konstruo de la unua konstanta ponto traarkanta la riveron Danubo. Li invitis inĝenierojn por plani kaj konstrui ĝin. Lia ponto ankaŭ nun staras kaj portas la nomon: LÁNCZÍD (Ĉenponto). Ni povas danki al Stefano Széchenyi, ke per la ponto li kunligis la du Danub-bordajn setlejojn, kaj tielmaniere li estigis Budapeŝton al vera ĉefurbo de Hungario. La unua vaporŝipo de „La Unua Danub-Naviga Asocio”, fondita kun anglaj entreprenistoj, havis la nomon „Ferenc la unua”. Al lia nomo ligiĝas ankaŭ la pli poste ekiranta vaporŝipa veturado sur la lago Balatono. Nature la unua trafiklinio funkciis inter Vieno kaj Budapeŝto. Poste li fondis en Budapeŝto ŝipo-riparejon kaj ŝipfabrikon en 1835 sur insulo de Óbuda. Oni muntis tie ankaŭ la unuan maran vaporŝipon de Hungarujo. En 1836 li iniciatis konstruon de laminatmuelejo funkciigata per vaporo en urboj Sopron kaj Budapeŝto. Széchenyi okupiĝis pri la fondaĵoj de la Komerca Banko kaj Nacia Teatro. Poste li prilaborigis la planon de reguligo de rivero Tibisko, por atingi novan eblecon por ŝipa trafiko. Iutage la rivero Tisza (Tiso, Tibisko) kaprice fluis en sia fluejo, kun grandaj riverkurbiĝoj. Tiu rezultis, ke dum la grandaj printempaj inundoj la fluejo ne povis bone gvidi la grandkvantan akvon kaj ofte transpaŝante siajn bordojn ĝi kreis eĉ grandamplajn maron. Laŭ planoj de Pál Vásárhelyi (Paŭlo Vaŝarheji) oni tratranĉis la kurbiĝojn 101 loko por rektigi la riveron. En la 1848a revolucio li ne konsentis kun sia epokkunulo Kossuth, kiu per revolucio volis atingi la plenumiĝon de la hungaraj revoj. Széchenyi pace, reĝimfidele volis atingi tiujn, li timis la revolucion. Tamen, li entreprenis taskojn en la revolucia kabineto de grafo Lajoŝ Batthyány. Széchenyi ricevis la postenon de Trafika Ministro. Sed jam septembre en 1848, li komencis rekoni la subpreman, evoluo-baran rolon de la Aŭstra reĝimo, kaj seniluziiĝis, perdis sian animan ekvilibron. Laŭ konsilo de sia kuracisto, lin oni translokigis en la mensomalsanulejon de Döbling, apud Vieno-a. Li pensis ĝin sia politika rifuĝejo. Tie, li verkis plie. En sia lasta nefinita verko: „Disharmonie und Blindheit”: li tenis respondeca Vienon pro la subevoluiteco de hungaroj, kaj per tiu libro li kontraŭiĝis al la pli frue antaŭ li neatakebla Habsburg-reganta domo.. En tiu mensomalsanulejo li mortis propramane, la 7an de aprilo en 1860, ĉar li ne povis jam plutoleri la oftajn minacojn - per domesploro kaj demandoj pri politikaj aferoj – de la policaro de la Aŭstra reĝimo de Habsburgoj. Al lia nomo ligiĝas ankaŭ la iniciato de kreo de la Nacia Panteono kaj tomboĝardeno en la ĉefurbo. Ankaŭ tiu-ĉi lia sonĝo realiĝis. Tie dormas siajn poreternan sonĝon la elstaruloj de nia popolo. Tie ripozas ankaŭ s-ro Julio Baghy, la fama hungara esperantista poeto, aktoro kaj reĝisoro. Grafo Stefano Széchenyi mortis, sed liaj kreitaĵoj levis la hungaron al vojo de la pluevoluo. Ni hungaroj neniam povas forgesi siajn agojn. Grafon Széchenyi levis inter grandulojn de la hungara historio: sia lia amo al sia popolo, lia kredo en la homa evoluo, lia oferto-preteco, lia kreanta pasio, kaj praktika agado. Kaj ni scias, ke noblecon de la homo oni mezuras ne per ties nobelara rango, sed pri liaj agoj.

Stefano Széchenyi estis vera grandnobelo!

/Laŭ la hungara Vikipedio verkis: s-ino Adrienne: Pásztor Lászlóné/




2010, estas Jaro de Pastroj

La Jaro 2010a, estas ankaŭ **Jaro de la Pastroj** – anoncis pri tio: mem la nun reganta papo. Ni aŭdis, ke celo de la jaro estas, ke ĝi antaŭhelpu la agadon de pastroj pri sia renoviĝo. La homo rigardas la eksteron, sed Dio rigardas en la koron. La homo, kaj tiel ankaŭ la pastroj estas eraremaj, falemaj kiel la pluraj homoj. Servisto de Dio – devus forĵeti la homajn trezorojn. Pri la samo verkis sian pseŭdonime eldonitan eldonaĵon unu Budapeŝte vivinta romkatolika pastro, kiu estis dum sia vivo ermito de la jarcent-turniĝa Hungarujo, pri kiu temas mia sekva historio.

s-ino Adrienne Pásztor

Sinjorino Adri Pásztor Ermito de nia epoko



La ermito

Vi scias, ke multaj pastroj, pastoroj, rabenoj vivas en la mondo. Nun mi, rakontos pri iama romkatolika pastro, vivanta en Hungario, Budapeŝto. Kiam mi ekkonis lin, li povintus esti jam patro mia, - anstataŭ la mia jam pli frue mortinta, - rigardante lian aĝon. Sole li vivis, en la de sia patro al liaj infanoj iam aĉetita kvin ĉambra loĝejo. Ja la romkatolikaj pastroj ne rajtas fondi propran familion. Post morto de sia frateto kaj panjo, li ne vokis al si sian fratineton, vivi ĉe li en la patra loĝejo. Li ne volis, ke aliuloj adaptiĝu al sia vivmaniero kaj ankaŭ li ne volis dividi sian vivon kun aliuloj. Tiel post morto de panjo de la maljuna pastro, la fratino vizitadis lin po du semajnoj, portante por la frato porsemajnajn manĝaĵojn, ĉiam purajn vestaĵojn kaj la bezonatajn purajn aĵojn al la doma mastrumado. Per la dompurigado kaj la alia prizorgo ŝi volis, ke la frato havu neniom da manko pri la virina prizorgo. Vere la frato foje diris al ŝi, ke ŝi faru nenion en lia intereso, ĉar li estas prizorgata bone de la kreduloj. Ŝi rememoris kiel portis la kreduloj la dikigitajn anserojn kaj kokojn al la ermito de Fallóskút en la montaro Mátra, dum iu eklezia festo. Sed la fratino faris tamen ĉion laŭ sia bontrovo, ĉar ne trovis spurojn de la necesa prizorgo pri sia frato. Aliokaze la pastro turnis sin al sia fratino:” kia feliĉo estas ke li ne devas pagi pro la prizorgoj, ĉar tielmaniere li povas meti sian tutan monon al la templaj monujoj por la gemalriĉuloj.” Kaj vere okazis tiel. La fratineto vidis kelkfoje, kiel metis ŝia frato siajn grandsuman pension en monujojn de la proksimaj kaj malproksimaj preĝejoj. La frato pensiuliĝis kiel ĉefinĝeniero. Li poste finis la teologion. En kadro de la romkatolika eklezio li diservis 21 jarojn, kiel romkatolika pastro. Pro la prizorgo pere de la fratineto, li vivis nur el sia pastra monata salajro, kaj la restintan monon li povis meti en la bankon por kolekti kiel postmortan donacon al la malriĉuloj de Budapeŝto. Li ne rememoris pri la grandaj festoj de la gefrata familio, li neniam donacis ilin. Ja, la fratino kaj ŝia edzo laboris, neniam plendis, do ili certe havis bonajn vivcirkonstancojn, kial do ili estu donacataj de li? Dume precize pasis la tempo kaj la frato iĝis 85 jaraĝa. Post la festo de lia naskiĝdatreveno, li petis la fratineton ne serĉu lin por prizorgi, ĉar li trovis iun kredulon kiu prizorgos lin same kiel fratino, kaj li vere ne deziras jam plie. La fratineto petis, ke povu ŝi ekkoni la bonanimon, por trakaresi tiun. Sed tiu renkonto ne realiĝis. Poste la fratino vane serĉis la fraton plurfoje, ne trovis lin hejme. Kiam fine ili renkontiĝis, en la loĝejo regis granda malordo, kaj mankis kelkaj objektoj. Al demando, la frato tion respondis, ke li deziras lasi eniri en la loĝejon neniun. En la tuta kvin ĉambra loĝejo la plankoj estis grizaj de la polvo kio kovris ĉion, sur la planko paperetmontoj etendiĝis. Je nova demando la frato tion respondis, ke por neforgesu la farenaĵojn, li skribas ĉion sur paperon. Sed la jam ne necesajn paperetojn li tial ne forĵetas, ĉar tiel li ĉeestas ĉie, li ne sentas sin sola. Li estas la plej bona societo por si mem. Li jam volas elspezi neniom por si mem. Li jam ne plibonigas la malboniĝantan kamentubon, li ne uzas elektrolumigadon, li hejtas per nek ligno, nek gaso, nek kurento, – tiuj estas forigitaj el sia loĝejo. Por nefrostiĝi vintre en sia loĝejo, li bone sinvestiĝas por la nokta mallumo. Sed por la tago la suno varmigas la loĝejon, el kio restas iom ankaŭ por la nokto. Ne uzante vespere la lampon, la forrestintan vesperan laboradon li anstataŭas tiel, ke li ellitiĝas per la unuaj matenaj sunradioj, kaj post tio tuj eklaboras. Nenion lukson li deziras tiel, li povas doni lian havaĵon al la nenihavantoj. Sed li donas pluse siajn instruajn pensojn al la homoj, ĉar dume verkis ankaŭ du librojn. En la pseŭdonome eldonita sia unua libro, li prijuĝis siajn pastrokunulojn vivantaj ili lukse per multekostaj aŭtomobiloj, televido, telefonoj, multekoste nutrante sin dum iliaj eksterlandaj vojaĝoj. Li sekvis ekzemplon de Francisko la Sankta, forĵetite la de liaj pastrokunuloj spertitan luksan homan vivmanieron. Ankaŭ lia alia verko havis eklezian temon: Rolo de pastroj de Sankta Maria, en la nuna romkatolika eklezio. En ĝi li publikis siajn instruojn kiel devas vivi la pastroj, ekzemplodone al la sekvaj generacioj, por pluvivo de la eklezio, ĉar ĝia rolo ne disvastiĝis ekde la hungaria politika ŝanĝiĝo. Li prijuĝis punojn de la eklezio. Lia dua libro estis ankoraŭ ne eldonita, kiam li eksentis finon de sia vivo. Li faris skribe sian lastan volon. Li lasis sian tutan havaĵon ne al sia fratineto, sed al iu monaĥejo, por prizorgi la malriĉulojn el tiu

heredaĵo, ke li povu pace ripozi en la jam sopirita transmondo. Post kelkaj monatoj, post longa sed tolereme tenitaj suferadoj li mortis en sia 86-a jaraĝo. La fratino informite pri la finvolo, petis la ordenon por ricevi iom el la valoro de la siapatra loĝejo. La ordeno kaj ŝi konsentis tiutage. Por la maljuna pastro-oĉjo la sameklezianoj aranĝis pompan pastran entombigan ceremonion por honorigi lin, kiel sian mortinton. Sed kiam ili sciigis pri tio, ke la mortinto sian 53 milioforint-valoran havaĵon ne por ili lasis, ili repetis la egalvaloron de la de ili aranĝita pastra entombigita ceremonio. La ekdonacitaj pagis por la romkatolika eklezio la deziratan sumon. La fratineteto havis amaron, ĉar unu el la ceremonion farantaj pastroj ne venis al ŝi, esprimi kondolencon. Sed ne nur ŝi havis amarajn pensojn sed ankaŭ tiuj ĉeestantoj, kiuj konis kaj amis la mortinton, ĉar la estintaj pastro-kunuloj en sia morto humiligis sian pastrokunulon kiu vere meritis la finceremonion de ili, sed ĉi agon ne. Ili aĉe agis per tiu homo, kiu estis ermito de la 21a jarcento, kiu agis en sia tuta vivo, en intereso de la katolika eklezio, en disvastigo de la dio-kredo. Li entreprenis malsaton, vintre nehejtitan ĉambron, monon al mono kunmetante kolektis sian monon por helpi la nenihavantojn. El tiu por si ricevita donaco de la vivo, li klopodis la plej multe pludonaci al tiuj homoj, kiuj pro io ne estis same donacitaj de la vivo. Post la entombiga ceremonio ni diris: “Bona estas, ke ĉi agon de la eklezianoj jam ne povis vidi la mortinto.” Iu respondis je tiu: “Eble tiam li dirintus: Mi sciis, ke ne indas lasi mian havaĵon al miaj pastrokunuloj, ĉar kiuj estas monavaraj, venĝemaj, sensentemaj, tiuj ne meritas la diodonacitajn terajn havaĵojn, krome la de mi prizorgitaj malriĉuloj certe ne ricevintus de ili miajn valoraĵojn garditajn kaj ricevitajn de Dio, kiujn mi nun pludonacis por ili.”



Tago de la Poezio en Hungarujo

Okaze de la tago de Poezio en Hungarujo, la HAT és MAIT (verkistoj de nia region: departamentoj BAZ) aranĝos festan kunvenon en urbo Szerencs, je la 9a de aprilo 2010a. Saluton diras: d-ro Ernő Gaál, la aranĝaĵon malfermas: la urbestro Endréné Rónavölgyi. Rolos: la per“Kossuth- medalo”distingita teatra aktorino Ildikó Pécsi, pianludos: s-ro János Körmendi.

La famon sendis: d-ro Ernő Gaál

Lillafüred – Attila József (1905-2010)



Mi proponas nun, ke vi promenadu ne nur en la interno de nia urbo Miskolc, sed vojaĝu **al la ekstera parto de la urbo, al** Lillafüred kaj tie enspiru la blovon de la montaj ventoj, aeron de tiu bela regiono. Ja ankaŭ tie vi povos trovi interesajojn, kaj ne malmulte. **Tie troviĝas** la lago Hámori, sur ties bordo sed aliflanke la bele situanta Palac-hotelo, la grotoj, Domo de Ottó Herman, la akvofalo, la Metalurgia Muzeo, montoflanke Esperanto-fonto, ĉe subo de la Palac-hotelo sur unu teraso vi trovos statuon de la hungara poeto Attila József, kies skulptaĵon preparis la skulptoartistino sinjorino Eva Varga; - premiita per Munkácsy-premio - **okaze de** la 100a jardatreveno de naskiĝo de la poeto - la 11an de aprilo 2005a. La poeto estis revolucio-inspirata, la plej granda reprezentanto de la hungara liro: apud poezio de Sándor Petőfi kaj Endre Ady. Liaj poemoj spegulas, ke li rigardis la mondon tra okuloj de la tiamaj laborist-klasanoj. Al fremdaj lingvoj tradukitaj liaj poemoj **aperis en Rusio**, Slovakio kaj en Pollando. Ankaŭ nuntempe okazas esperantigoj de liaj poemoj. Pere de iliaj presitaj kaj retaj aperformoj, la poemoj de Attila József, nun jam ĉeestas en ĉiuj landoj de la tuta mondo. La **plej gravajn esperantigojn verkis ĝis nun** sinjoroj d-ro Kálmán Kalocsay, Márton Fejes kaj Imre Szabó.

Attila József

LULKANTO

(*Altató*)

Okulon fermas la lazur',
la kampo dormas sub kovril',
okulojn multajn fermas mur' –
ekdormu bele, eta fil'.

La kapon klinas al pied',
skaraboj dormas mil kaj mil,
kun ili dormas zumzumet' –
dormu bele, eta fil'.

La tramo dormas kun plezur',
susuras ĝis sonoril',
kaj sonĝe mildas la vetur' –
ekdormu bele, eta fil'.

Surseĝe dormas la mantel',
dormetas kun ĝi ĉiu ŝir',
finita por ĝi la sufer' -
ekdormu bele, eta fil'.

Ekskurso dormas ĉe river', -
dormetas pilko kaj fajfil',
kaj dormas dolĉo en suker' -
ekdormu bele, eta fil'.

La foro estas vitra glob',
ricevos ĝin vi por admir',
kaj dia estos via pov' -
ekdormu bele eta fil'.

Soldato estos vis en tim',
paŝtisto kiel en dezir',
ekdormas, vidu la patrin' -
ekdormu fine, eta fil'.

/Purakore-2006-Tradukoj de Imre Szabó/

Ottó Herman (1835-1914)

Karaj legantoj!

Ĉijare estas la **175 jara datreveno de naskiĝo de tiu Ottó Herman**, kies domon ni povas rigardi en Lillafüred, krom la **pri li nomita Muzeo de Miskolc**. Kion vi scias tamen pri li? Do, li estas homo neforgesebla, kiu multe donis al ni, ni multajn konojn heredis de li pere de liaj verkoj. Li naskiĝis en Breznóbánya, ne sur teritorio de la nuna Hungarujo. Sed lia patro kiu estis kuracisto, kune kun siaj familianoj **translokiĝis al** Miŝkolc-on 1847, kaj de tiam Ottó



Herman vivis ĉi tie kaj ankaŭ entombigita estas en la tombejo de la **iama Miskolc-apuda** vilaĝo Felsőhárom. Inter 1853 kaj 1856 li lernis en Vieno, por esti maŝinmuntisto. Tie vekigis en li interesiĝo pri la natursciencoj. Poste li iĝis inĝeniero, sed lia engaĝiĝinteco pri la arkeologismo kaj natursciencoj allogis lin sur alian vivovojon. Pere de grandioza kolekta laboro li verkis libron **Pri la araneo-faŭno de Hungarujo** (1876-1879). **Kiel internacie rekonata scienculo de la ornitologio li verkis multajn sciencajn artikolojn, studojn, librojn.** Sed li verkis ankaŭ pri aliaj temaj. Inter ili estas la sekvaj: Praaj spuroj en la hungara popoleca fiŝado, La mallonga resumo de la fiŝbredado, La vizaĝo kaj karaktero de la hungara popolo, Pri la utilo kaj damaĝo de la birdoj (1901), Pri la Nordaj birdloko...ks Li, la multflanka natursciencisto antiklerikale pensanta evoluidea politikisto estis, kaj de la 1879a jaro li estis parlamenta deputito **de la**

“Sendependeca Partio”, sed **adepto** de Lajos Kossuth. Al lia nomo ligiĝas la fondo de la Hungara Ornitologia Asocio, kaj la fakto, ke li estis la **iniciatinto** de la hungarlandaj esplorfosadoj por trovi la restaĵojn de la prahoma kulturo. La laborojn oni komencis sur la

monto Avas, poste li faris en grotoj de la montaro Bükk. **Li verkis elstarajn sciencpopularigajn verkojn pri siaj novakiritaj konoj.**

Li estis edziĝinta kun la verkistino Kamilla Borosnyai. Li estis honorigita per franca honordiplomo. En 1914 li mortis pro **pulmomalsano**. Lian memoron gardas **multaj naturprotektaj societoj, turistdomo**, lia memordomo en Lillafüred, **kaj groto** en Lillafüred, kiu tamen vizitebla estas **nur de speleologoj**, sed iĝis konata pro la tie esplorfositaj prahomaj ŝtonlaboriloj.

Laŭ la hungara Vikipedio verkis: s-ino Adri Pásztor

D-ro István Dobrossy

Miskolc

La Muzeo „Herman Ottó” en Miŝkolc

„Urbhistoria ekspozicio “Jarcentoj de Miskolc”

- La hungarlingvan tekston esperantigis: László Pásztor –

- daŭrigo -

La dua ĉambrego prezentas la 18. jarcentan historion de **la** urbo Miskolc. Ĉi tiun pli mallongan periodon oni prezentas helpe de eksterordinare riĉaj objektoj kaj dokumentoj. Ĉi tie estas dokumentoj de la urba aŭtonomio, plej belaj memoraĵoj de la gildindustrio, dokumentoj de grekaj komercistoj kaj memorobjektoj de la en Miskolc loĝantaj grekaj komercistoj. Ĉi tie estas videblaj ankaŭ memorobjektoj de la religia vivo, de la transformiĝo de la urba socio kaj de la politikaj bataloj. Ĉi tiu periodo signifis por la loĝantoj finon de la turkaj tempoj, malfacilan tempon de la rekomenco, militajn elspezojn de liberecbatalo de Francisko Rákóczi kaj dum la pacaj jaroj la duan prosperon de la ekonomio kaj disvastiĝon de la klerismo.

En la 18. jarcento la miŝkolcaj burĝoj liberiĝis de pli ol unu kaj duon jarcentaj /1536-1703/ ŝarĝoj de garantiaĵbienuloj helpe de trifoje paĝo /1703,1731,1744/. En la unua duono de tiu jarcento ili ĉesis plenumi la naturaĵojn, la devigajn servutlaborajn ŝarĝojn, sed pro la Grassalkovich-kontrakto - ekde tiam la urbo iĝis ĉambra bieno – la feŭdaj dependeco iĝis pli striktaj. La ŝanĝojn bone esprimas formiĝo de strukturo de la setlejo kaj formiĝo de nombro kaj konsisto de la loĝantaro. La nombro de la loĝantoj estis komence de la jarcento 4000 personoj, en 1786 estis 14000 personoj. Ĉi tiel la urbo iĝis tro plenŝtopita: en 72 stratoj estis 2400 loĝdomoj.

La ekspozicio ilustras transformiĝon de la socia, religia, nacieca konsisto. Tiel ŝajnas, ke nombro de la nobelularo grandiĝis dum la turkaj tempoj. Dum tiu tempo translokiĝis al Miskolc la familioj Dóry, Aszalay, Máriássy, Vay, Almássy, Szepessy, kiuj plejparte sur la ĉefstrato de la urbo aĉetis parcelojn kaj domojn. En tiu ĉi ĉambrego esta la bele restaŭrita 18. jarcenta kostummateriale de familio Szepessy. Oni trivis tiun en kriptoj de la preĝejo de monto Avas en 1942.

Estas videbla tiu statistika libro, kiu estas la unua ekonomia topografado. Laŭ ĝiaj indikoj estis la bazo de ekonomia vivo de la kampurbo kaj la vino produktita en Miskolc kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo. Por deponi la vino oni konstruis specialan kelaron sur montetoj de la urbo, ĉefe sur monto Avas. Oni listigis 558 kelojn sur montetflanko de Avas en 1702.

La vinberproduktadon instigis la en komenco de 18. jarcento ĉi tie ekloĝintaj balkandevenaj, ortodoksreligiaj komercistoj / mallonge: „grekoj”/. Ilia kolonio vigligis ankaŭ eklezian kaj

kulturan vivojn de la urbo. Ili havis preĝejon, lernejon, ties memoraĵoj /kalkulraportoj, lernolibroj, lerneja terglobo videblas en la vitrinoj kaj sur diapozitivaj bildoj.

La komercado, la kampurbaj privilegioj kaj la urba ĉirkaŭaĵo helpis la gildan industrion evoluiĝintan en Miskolc ekde la mezo de la 16. jarcento. Dum la 18. jarcento abundiĝis nombro de la metioj, estiĝis novaj gildoj / butonfaristoj, felpaltofaristoj, barelfaristoj, bakistoj, potfaristoj, ŝuistoj, ktp./ . Iliaj objektaj memoraĵoj /ŝildoj, gildokestoj, gildosigeloj/ ĉeestas inter objektoj de la ekspozicio. Inter dokumentoj de la gildoj troveblas la bele ornamita protokolo de la potfarist-gildo.

En tiu ĉi jarcento vivis en Miskolc tri pentristoj: Johano Vorenencki, Francisko Lieb kaj nobelulo Jakobo Stefano Fabriczius. Ĉi tie naskiĝis Gabrielo Dayka, unu el la plej eminenta lirikisto de sia epoko kaj Johano Nagyváthy, eminenta figuro de la hungara ekonomika scienco. Same en Miskolc vivis dum kvar jardekoj Samuel Benkő, fizikisto-medikisto, pioniro de la miŝkolca historioskribo. Ĉi tie vivis Vencel Klír, arkitekto, kiu estis eminentulo de formigo de la 18. jarcenta urbo. Dume validiĝis la liberalaj idealoj, en 1781 fondiĝis la framasona loĝio nomita „societo de virtaj migrantoj”. Inter ties anoj estis ankaŭ Nikolao Vay kaj Francisko Kazinczy.

Ĉi tie videblas la plej frua mapo de Miskolc el 1759. kaj urboprezentadoj, kiuj estis konservitaj sur gildoleteroj de la 19. jarcento.

En la tria ĉambrego de la ekspozicio oni prezentas objektajn kaj dokumentajn memoraĵojn, kiuj pruvas, ke la pli ol 13 mil loĝantojn havanta Miskolc en la 19. jarcento iĝis nediskuteble grava ekonomika kaj kultura centro de Nordhungario. En la urbo kaj en ĉirkaŭ la urbo aperis diversaj industriaj formacioj, kiuj diferencis de la gildoj kaj estis jam antaŭaĵoj de la fabrikindustrio. Henrik Fazola, seruristmajstro de Würzburg estigis ferfandejon en la nuna Ómassa, al kiu aliĝis uzino en Hamor ne delonge feron prilaboranta. Oni utiligis arbojn de la arbaroj en vitrofandejoj, kie estas farite fenestrovitroj kaj vitroboteloj por la loĝantaro. En iu vitrino oni prezentas ĉi tiajn produktaĵojn, en alia vitrino videblas la plej belaj de la en 1838 estigita ŝtonvazfabriko.

La urbo havas kulturan rolon, kiun atestas la tie estantaj lernejoj. En liceoj de la reformacianoj kaj luteranoj lernis Johano Nagyváthy, Bartolomeo Szemere kaj Otto Herman. En 1881 komencis funkcii la unua presejo de Miskolc, kiu faris kalendarojn, librojn kaj teatrajn afiŝojn por la teatro fondita en 1823 . Ĉi tiel ĝi iĝis fama. Efike de ĉi tia kultura ĉirkaŭaĵo edukiĝis kaj aperis tiu popoltavolo, kiu klopodis defendi la nobelulajn privilegiojn kaj la sociajn reformojn. Reformoj de antaŭgeneracio de Gabrielo Dayka ankoraŭ ne estis decidaj. De dua jardeko de la 19. jarcento pli kaj pli larĝiĝis socia bazo de la reformoj, ties organiza formo estis la miŝkolca t.n. „Major-strata scienca societo” kaj la „Kulturondo de Borsod” fondita de Bartolomeo Szemere. Engaĝiĝintaj adeptoj de la nobelularo kaj burĝaro regule renkontiĝis en la kazino de Miskolc, kie ili povis ŝanĝi opiniojn unu kun la alia. En la ekspozicio estas videbla detalo de rekonstruado de la kazino, kiu prezentas ankaŭ loĝejkulturon de la pli bonstata miŝkolca burĝaro.

La vizitanto povas spekti en ĉi tiu ĉambrego, kiel la urbo iĝis centro de la regiono pro ĝia ekonomika situacio dum la tempo de la liberecbatalo de 1848/49. Poste la jaroj de la absolutismo reviviĝas sur la afiŝoj, kiel sur miŝkolcaj presaĵoj. Ni povas vidi pere de dokumentoj kaj diapozitivaj Miskolc-on de la 1850/60-aj jaroj.

Famaj de peŝta revolucio/ la 15-a de marto 1848/ nur malfrue alvenas al Miskolc. Nur leteroj de en Peŝto vivantaj, lernantaj miŝkolcanoj informas pri tio. Inter aliaj videblas originalaj leteroj de Jozefo Butykay, ŝtonvazfabrikisto, ĉefleŭtenanto en 1948.. La Miŝkolca Informilo, kiu estis iniciatita, lanĉita de Bartolomeo Szemere, informas detale pri la okazintaĵoj, ties riĉaj objektaj ka skribaj memoroj aperas elektite. Fondantaj dokumentoj, batalkantoj, regularoj de la nacigardistaro pruvas, ke la nobelularo kaj burĝaro estis pretaj batali por defendi la patrujon. La bataloj de printempo de la 1848/49. jaroj okazis ĉirkaŭaĵe

de la urbo /Kassa, Forró, Tokaj, Tarcál, Kápolna./ Sur la afiŝoj, kiuj aperis en Miskolc, kaj informis pri la militaj okazintaĵoj, oni instigis la reziston kaj helpis gardi la ordon. Sur tiuj afiŝoj Bartolomeo Szemere estis la subskribanto kiel registara komisaro. Li naskiĝis en departemento Borsod, en vilaĝo Vatta, en Miskolc vivis kaj agadis kaj estis ministro de internaj aferoj de la unua respondeca hungara registaro, poste en 1849. estis ĉefministro. Simila persono estis en tiu ĉi epoko László Palóczy /Ladislao Palóczy/. Liaj memoraĵoj, relikvoj videblas en la ekspozicio.

Trairante la koridoron ni atingas urbohistorion de epoko de la dualismo. Sur muro de la koridoro ricevis lokon la historia portrethalo de departemento Borsod. La grandioza oleopentraĵoj prezentas funkciulojn de la departemento – ĉefjupanon, parlamentan delegiton, notarion – en tiama kostumo. Inter ili estas videblaj: Jozefo Lévy, poeto, Bartolomeo Szemere, politikisto. Ĉi tie estas pentraĵo de Nikolao Barabás pri László Palóczy, ties figuro estas naturgranda sur la pentraĵo kaj en la fono videblas la fortikaĵo de Pozsony. /=Poĵonj, Bratislavo./

- Daŭrigo sekvas -

D-ro Kálmán Kalocsay **La amo**

La am' ne estas ludo,
Sed forta sorta trudo,
Ĝi ŝvingas sian vipon,
Al lip' pelante lipon.

Ni timas ĝian baton,
Kapricon, senkompaton,
Sed ĝis jug' ni svenas,
Sed tamen ĝin ni benas.

/K.Kalocsay – Streĉita Kordo – Eldonis Literatura Mondo Budapeŝto 1931/

Ŝercoj

La lernanta ŝoforo

Ĉe la benzinstacio la lernanta ŝoforo haltigas la aŭton por plenigi la benzinujon. La laboristo de la benzinstacio avertas la lernantan ŝoforon:

- Kial vi ne haltigas la motoron, se volas plenigi la benzinujon?
- Mi *haltigas ĝin* – respondis la lernanto-ŝoforo.
- Kial ĝi skuiĝas tamen?
- Ĉar ĉi tiu instruisto, *kiu sidas apud mi, tremadas ankoraŭ nun.*

La ŝafisto

Eksterlandaj turistoj ekskursas en la hungara pusto Hortobágy. Ili atingas iun ŝafiston, kiu gardas la ŝafaron. Iu ekskursanto demandas de li:

- Ĉu ne estas *enuige esti ĉi tie kaj fari nenion?*
- Ho, ne! – respondis la ŝafisto – ĉar iu ĉiam venas ĉi tien, kiu havas nenian *farendaĵon* kaj demandas ĉiuspecajn *stultaĵojn!*

La kaŝdenuncanto

En la gazeto aperas iu anonco, laŭ kiu la polico serĉas luphundojn. Inter la anonciĝantoj estas ankaŭ sinjoro Kovács, kiu kondukas per ŝnureto iun hibridan melhundon.

- Kion vi volas fari ĉi tie? – admonis la oĉjon la policisto.
- Mi pensis pri tio, - respondis la homo – *certe taŭgus* ankaŭ iu kaŝdenuncanto.

/El iu ŝercogazeto elektis kaj esperantigis: László Pásztor/

Internacia leterkesto - novaĵoj

Pollando - Esperantistoj en la pola parlamentejo



“La 4-an de marto 2010 la vicprezidanto de Pola Sejmo (la malsupera ĉambro de la pola parlamento) – Jerzy Szmajdziński akceptis en la Parlamentejo geesperantistojn: d-rino habil. Ilona Koutny, Francisko Witucki, Eduardo Kozyra, Kazimiro Krzyżak kaj Mariano Zdankowski . La vicprezidanton akompanis deputito de Pola Sejmo, Leszek Aleksandrak. En la renkontiĝo estis planita prof. Krystyna Łybacka, eksministrino pri edukado, sed ne povis partopreni (renkontiĝo kun la parlamentanino Łybacka estas planata en Poznano en proksima tempo).

La geesperantistoj prezentis al la vicprezidanto la deziron, ke Esperanto ricevu statuson de lingvo , samranga kiel la aliaj fremdaj lingvoj en la pola edukad-sistemo .

La parlamentanoj kun bonvolemo rilatis al la propono. Ili sugestis , ke la E-grupo proponu al la ministro pri edukado komenci proceduron por la realigo de la prezentita celo. Ili samtempe deklaris apogi la iniciativon.

La renkontiĝo pasis en amika etoso kaj finiĝis per komuna foto.

["Undisclosed-Recipient:~@poczta.turbo.pl"](mailto:Undisclosed-Recipient:~@poczta.turbo.pl)

POLA SEJMO (PARLAMENTO)

La 6-a elektperiodo, la 17-a kunsido, la 1-a tago (la 11an de junio 2008)

la 11-a punkto de la tagordo:

Raporto de la Komisiono de Kulturo kaj Mediatoj pri la parlamentana projekto de la rezolucio por honorigi la 100-an datrevenon de UEA (presaĵoj kun n-roj: 486 kaj 536)

PARLAMENTANINO KRYSZYNA ŁYBACKA:

Sinjoro Prezidanto! Altestimata Supera Ĉambro!

De longa tempo la homoj deziras atingi pacon kaj interkomprenon.

Multaj baroj, interalie la lingva, ne nur gvidas al miskompreno kaj kvereloj inter du personoj aŭ malgranda grupo da homoj, sed ankaŭ kaŭzas ofte militojn. Tiun veron komprenis pola kuracisto, juddevena Ludoviko Zamenhof. Li naskiĝis en Bjalistoko, kio ne estas sensignifa, ĉar tiam en la 1859 jaro ĝi estis nacia konglomo de poloj, rusoj, germanoj kaj judoj. Zamenhof mem lernis oficiale la rusan.

(Sinjoro parlamentano Woda, mi estus dankema se mi povus daŭrigi)

Hejme li parolis jide kaj pole. Li komprenis kio signifis lingva baro. Tial jam de juna aĝo, en gimnazio li komencis krei la lingvon por forigi tiun baron. Tiun junecan fervoron li poste evidentigis (subtenis) per multjaraj studadoj pri multnaciaj lingvoj. Rezulto de tio estis publikigo de verdire, artefarita lingvo, sed laŭ lingvistoj tre proksiman al la hindoeŭropaj lingvoj, sub pseŭdonomo D-ro Esperanto, t.e. havanta esperon - belega pseŭdonomo - havanta esperon por paco kaj interkompreno de popoloj kun diversaj kulturoj, religioj kaj lingvoj.

La atingitaj rezultoj iĝis pli grandaj ol atenditaj. Miloj da homoj en la tuta mondo estis ravitaj de la lingva simpleco kaj la utileco. En tiu lingvo estas ebla esprimi ĉiujn pensojn, emociojn, kion atestas multaj publikaĵoj, interalie la traduko de "Sinjoro Tadeo".

Zamenhof mem rezignis pro personaj rajtoj al la lingvo, li opiniis, ke la lingvo devus aparteni al la homaro. Tial la personeco de tiu eminenta polo rememoras, kiel ankaŭ ni menciis - alies kontinuantojn, ligitaj kun la Universala Esperanto-Asocio, kies 100-an datrevenon ni festas ĉijare.

Kiam Zamenhof mortis, ĉe lia entombigo la predikanto diris tiujn vortojn – Altestimata Supera Ĉambro, permesu, ke mi citos: "Venos momento, kiam tuta pola tero komprenos, kian gloron donis tiu granda filo al sia Patrujo".

Altestimata Supera Ĉambro! Tiu momento ĵus alvenis. La maldekstra frakcio de nia parlamento, kiu estas iniciatinto de la rezolucio, plene ĝin subtenas (aplaŭdoj).

(Parlamentano Jerzy Feliks Fedorowicz: Brave!)

(Sendinto: powiat.malbork.pl esperanto@powiat.malbork.pl)

Al gratulo de gesinjoroj Pásztor, la suban mesaĝon ni ricevis:

„NOME DE LA TUTA GRUPO "ESPERANTO POR EUROPA UNIO" MI DANKAS AL
CHIUJ SENDINTOJ DE LA GRATULOJ KAJ AL **REDAKTORO DE LA REVUO**
"ESPERANTO" KIU APERIGIS LA KOMUNIKAJHON KUN LA FOTO EN LA PLEJ
GRAVA OFICIALA ORGANO DE UEA (**ESPERANTO** aprilo 2010 1235 (4) .)

AMIKE,

EDUARDO KOZYRA, VICPREZIDANTO DE PEA

ESPERANTO

aprilo 2010 1235 (4)2

„Ŝipkrozado ĉirkaŭ Aŭstralio kun Papuo Nova Gvineo


Internacia Klubo Esperantotur en Bydgoszcz, Pollando aranĝis la 26 Internacian Simpozion pri Esperanto – Turismo dum 23.02 – 20.03.2010, kiu enhavis ege interesan ŝipkrozadon ĉirkaŭ Aŭstralio kun Papuo kaj Nova Gvineo dum 26.02 – 15.03.2010 per luksa ŝipo Rhapsody of the Seas. Ni flugis el Varsovio tra Londono – Hongkongo ĝis Sydney, la plej bela haveno de la mondo, kiun ni vizitis dum du tagoj. Ni enŝipiĝis en Sydney, kaj krozadis al Brisbane. Bedaŭrinde tiutempe tsunami en Ĉilio malhelpis nian ŝipon pro sekureco eniri la havenon de Brisbane do ni daŭrigis al Airlie Beach por viziti la plej faman Grandan Koralrafon kaj poste al Cairus kun ekskursoj i.a. al Kuranda. Sekvis ŝipkrozado al Papuo Nova Gvineo kun tuttaga vizito en Port Moresby i.a. kun Nacia Muzeo, Parlamento, belega Botanika Ĝardeno kaj interesaj prezentadoj de papuaj kaj novgvineaj dancoj kaj muziko. La plej varmega (pli ol 40 ° C) estis ŝipkrozado al Darwin kun vizitoj en naciaj parkoj kaj renkontoj kun amaso de krokodiloj kaj aliaj aŭstraliaj bestoj. Post Darwin ni daŭrigis la ŝipkrozadon al Broome kaj Exmonth de kie al Fremantle – Perth kie ni finis la 18-tagan luksan ŝipkrozadon kun abundega manĝado kaj tre riĉa surŝipa programo, kiun realigis i.a. ŝipa Rhapsody Orkestro, kelkaj muzikensembloj el Aŭstralio, Jamajko kaj Pollando, 14 persona kant – danca ŝipensemblo, kaj pluaj talentaj individuaj artistoj de diversaj landoj. La 2000 pasaĝerojn tre bone priservis ĉ. 700 personoj el 54 landoj de ŝipanaro de “Rhapsody of the Seas”. La direktoro de la ŝipkrozado informis, ke krozas pasaĝeroj el 44 landoj, kiujn prezentis-forgesinte pri la 20-persona pola grupo verŝajne pro tio, ke ni aliĝis pere de usonaj vojaĝagentejoj, do por li Pollando estis parto de Usono, kvankam poloj ankoraŭ bezonas usonajn vizojn. Post la ŝipkrozado ni pasigis kvar tagojn por vizitado de Okcidenta Aŭstralio. La plej kontentaj por ĉiuj estis la lunĉo per kiu Klubo Esperanto en Perth gastigis nin en Kings Park kaj poste ege interese gvidis nin en Esperanto tra Perth. Ni ege dankas al Esperanto – Ligo de Okcidenta Aŭstralio el Perth kaj gvidantoj S-inoj Trish kaj Shirley, kiuj preparis kaj gvidis nian Esperanto – lunĉon kaj vizitadon de Perth. En realigo de vizitado en Okcidenta Aŭstralio helpis ankaŭ pola Esperanto vojaĝgvidanto Janusz Wolak kiu nun loĝas en Aŭstralio. La Simpozion gvidis Andrzej Grzebowski el Bydgoszcz, Pollando. Ni ĉiuj revenis el Aŭstralio kun unutagaj vizitadoj en Hongkongo kaj Londono tre kontentaj. Jam nun ni planas sekvontaj ŝipkrozadoj per la sama ŝipo Rhapsody of the Seas. La novjaran ŝipkrozadon Sydney – Nova Kaledonio – Sydney dum 27.12.2010 – 2.01.2011, poste el Sydney, Aŭstralio – Varmatu – Fiĝio – Insuloj de Lojaleco – Nova Kaledonio dum 6-16.02.2011 kaj Aŭstralio – Tasmanio – Nova Zelando – Aŭstralio dum 5 – 25.03.2011. Aliĝi eblas jam nun por ricevi bonajn ŝip-prezentojn. Por la 27 Internacia Simpozio pri Esperanto Turismo dum 7.01 – 27.01.2011 SudaAmeriko – Antarktiko, aliĝis jam 16 personoj, do restas jam lastaj promociaj ŝipkrozadaj lokoj. Pliaj informoj ĉe:

INTERNACIA KLUBO “ESPERANTOTUR

str. M.Skłodowskiej-Curie10, PL85-094Bydgoszcz, POLLANDO, ☐ (48-52)346-11-51 ,

rete:

info@esperanto.bydgoszcz.eu



Japanujo - Virintago 2010a

“Karaj gesamideanoj en la mondo!

La 7an, marto, ni havis kunvenon de la Internacia Virina Tago en Hirosima 2010 kune kun 150 aktivulinaj. Akceptitaj mesaĝoj, portotaj al la Kunveno de Reekzameno de Ne-disvastiĝo de Nukleararmiloj, Novjorko, Usono en majo estas 344 el 66 landoj. En la kunveno en Hirosima la partoprenantoj havis presitan la mesaĝaron.

Ekspozicio de la mesaĝoj okazis ĉe Plazo por la Urbana Interŝanĝo unu semajnon, kaj ĉe Virina Eduka Halo de Hirosima unu semajnon antaŭ la Virina Tago. Kaj pli ol 1000 civitanoj venis al ĝi. Ĉe la kunveno s-ino Abe Kyoko, prez. de la plenuma komitato, esprimis dankon al esp-istoj kiuj sendis la mesaĝojn al ni virinoj de Hirosima.

Sekve kvin reprezentantoj el la komitato raportis siajn agadojn por paco. Ankaŭ OSIOKA Taeko raportis ke multaj esperantistoj kunlaboris kun ni, ne nur doni solidarecajn mesaĝojn, sed disvastigis la alvokon el Hirosima tradukinte en sian lingvon, per radiodissendo, ĵurnale k.t.p.

En Slovenio kaj Svisio esperantistoj bele organizis ekspozicion de Hirosima-Nagasaki! Do, partoprenantoj vere admiris kaj sentis ke multaj esperantistoj plene laboras por paco. S-ino atombombita prelegis sian sperton sub atombombado, alvokis kune lukti por nuligo de nukleararmiloj sur la tero.

Post la kunveno ni manifestaciis kantante, tenante florojn, apelante pacon sur strato al Paca

Parko. Ni certe portos viajn mesaĝojn al la Kunveno de reekzameno de NPT en Novjorko en majo.

Ni kore dankas vin ĉiujn!

OSIOKA Taeko, Hirosima Esperanto-Centro osioka@mua.biglobe.ne.jp
osioka@mail.goo.ne.jp

Bulgario – Balkana Esperanto renkontiĝo

“*Bulgario, Sofio, 8.05.2010 j.*

[*centroespero@ hotmail.com](mailto:centroespero@hotmail.com) *Poshtkesto 1000 Bulgario Sofio, p.k. 66 BEA*

Tel. 003592 898 34 64 88, 003592 4809328

Estimataj gesamideanoj,

La Organiza komitato por Balkana Esperanto – renkontiĝo kunlabore kun BEA invitas vin partopreni en la Balkana Esperanto – renkontiĝo, kiu estas antaŭvidita je 8.05.2010 j. en Sofio. La dezirantoj partopreni bonvolu sendi sian alighilon al*: [centroespero@ hotmail.com](mailto:centroespero@hotmail.com)
Prezidanto de la Organiza komitato

Dimitar Papazov”

Italujo – Triest - La 4a Internacia Konkurso – en la jaro 2010-a

“ Saluton!

Triesta Esperanto-Asocio lanĉas la 4an Internacian Konkurson -jaro 2010 pri la temo:

„La Kristnaska Kripo”.

Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun aĝo de 6 ĝis 14 jaroj, kiuj sendu, ĝis la 15a de novembro 2010, siajn verkojn al la jena adreso:

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Via del Coroneo

15—IT-34133

TRIESTE - Italia

Oni rajtas kontribui pri la supre indikita temo, per unu aŭ pli da faritaĵoj laŭ la kategorio:

Kat. 1) Desegnaĵo (ekz: “kiel mi imagas tiun tradician feston”, “la Kristnaska Kripo”, “familia festo”);

Kat. 2) Rakonto aŭ poeziaĵo, maksimume unu A4-formata folio (ekz: kiamaniere oni festas ĝin familie, pensoj pri tiu kristana festo, pri kristnaskaj tradicioj en propra lando, regiono, urbo; malgranda rakonto aŭ poeziaĵo pri kripo, pri la naskiĝo de Jesuo, kristnaska fabelo, ...);

Kat. 3) Manfaritaĵo (el gipso, ligno, metalo aŭ papero, aŭ el iu ajn alia materialo).

La ĵurio atribuos al Kat. 2) aldonajn 5 poentojn por favori la partoprenon en tiu ĉi branĉo.

La “rakonto” aŭ “poeziaĵo” estu en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro, kaj ĉiuj aliaj faritaĵoj estu akompanataj de frazo aŭ komentario en ambaŭ lingvoj.

Por ĉiu verko estu ankaŭ indikitaj:

- * persona kaj familia nomoj;
- * malgranda foto de la aŭtor/in/o;
- * aĝo;
- * lernejo kaj klaso;
- * poŝta adreso.

Ĉiuj konkursaĵoj prezentiĝos al publiko dum la kristnaska periodo 2010.

La vizitontoj donos poentojn al la plej bela verko el la tri kategorioj, kaj tiuj ĉi aldoniĝos al la poentoj de la ĵurio.

Oni anoncos la premiitojn, laŭ kategorio kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj [A]; de 9 ĝis 11 jaroj [B]; de 12 ĝis 14 jaroj).

/Sendinto: s-ino Elda Doerfler/

Francujo - Germanujo

La 5-an kaj 6-an de junio, ni partoprenos la "Bio" Feston en Murs-Erigne. Venu viziti kaj kuraĝigi nin.

⇌ La Kongreso de Sat-Amikaro okazos inter la 3-a kaj la 6-a de aprilo en Hillion (Cotes d'Armor).

⇌ Komuna Franca kaj Germana Kongreso okazos de la 21-a ĝis la 25-a de majo en la urbo Kaiserslautern (Germanio).

Kubo - UK

⇌ La 95-a Kongreso de UEA okazos inter la 17-a kaj la 24-a de julio 2010 en Havano (Kubo).

Rumanio - Braŝovo

⇌ La 83-a Kongreso de SAT okazos inter la 1-a kaj la 6-a de aŭgusto 2010 en Braŝovo (Rumanio).

/Anĝeva Folio- Angers/

Svisujo

Bonan tagon,

dankon pro via retletero, pardonu sed mi havas malmultan tempon dum tiu periodo, maloftan retkonekton kaj krome mi ricevis neatendinte multegajn gratulmesaĝojn el la tuta esperanta mondo pro tiu afero de la Muzeo de la Ludoj, kaj multaj ankoraŭ atendas respondon.

Mi iom restrukturis la tekston (ĉisube); pri fotoj vi povas laŭplaĉe elŝuti el

<http://picasaweb.google.ch/cescoreale/LeChateauDesJeux280609#>

Pri mi: mi estas itala voĉ-inĝeniero, profesie mi okupiĝas pri voĉ-analizo, kaj organizado de eventoj pri ludoj, lingvoj kaj scienco.

Mi estas UEA reprezentanto en UN Ĝenevo.

Plion vi povas trovi en la retejoj

<http://lingvaj-rajtoj.org/> kaj <http://www.youtube.com/user/EsperantoTv>

Lude,

Cesco Reale

La Svisa Muzeo de la Ludoj (kie mi laboras kiel ĉeforganizanto de la festivalo "La Kastelo de la Ludoj") konsentis aldoni esperanton inter la lingvoj elekteblaj por vizitoj kaj laborgrupoj.

Visites commentées et ateliers

(Français, allemand, anglais, italien, russe, espagnol, portugais, espéranto)

http://www.museedujeu.com/site/index.php?option=com_content&task=view&id=13&Itemid=28

Oni povus organizi esperantan grupon kiu vizitos ĝin, mi povus kunordigi la aferon, kaj ĉiĉeroni. La vizito daŭras ĉirkaŭ 1 horo; alikaze estas ankaŭ temaj laborgrupoj kie oni lernas specifajn ludojn (afrikajn, ĉinajn, romiajn, faraonajn, ktp), kiuj daŭras 90 minutojn inkluzive de la vizito.

La muzeo, en mezepoka kastelo, konservas ĉarmegajn ekzemplerojn de ludoj antikvaj kaj modernaj el diversaj landoj (Barato, Afriko, Ĉinujo, ktp). Poste oni povas ankaŭ resti en la belega parko ĉirkaŭ la kastelo, aŭ aldoni alian programeron, kiel la proksima Kastelo de Chillon (Ŝijon), aŭ la Alimentarium de Nestlé.

Eventualaj interesiĝantoj povas kontakti :

Cesco Reale, 0041 (0)76 234 18 43, cescoreale@gmail.com

aŭ rekte la Muzeon:

+41 21 977 23 00, info@museedujeu.com

<http://www.museedujeu.com/>

La Tour-de-Peilz, Svislando

Brazilio

Legio de Bona Volo

La koro kiu pulsas por la Homaro de 60-jaroj

Legio de Bona Volo (LBV), fondita en Brazilio de la karmemora radikomunikanto Alziro Zarur (1914-1979) en la 1-a de januaro 1950, estas bonfara, filantropia, eduka, klereca, filozofia, ekumena kaj altruisma, senprofitcela. Ĝi estas ĉefgvidata de la ĵurnalisto, radikomunikanto, verkisto, komponisto kaj poeto José de Paiva Netto (www.paivanetto.com.br). La Institucio, kiu ĝuas internacian prestiĝon sur la kampo pri Edukado kun Ekumena Spiritualeco, kunlaboradas ekde sia apero por plibonigi la vivo-kvaliton de popoloj en situacio de damaĝebleco aŭ socia risko. Ĝia misio: *Promocii Edukadon kaj Klerecon kun Spiritualeco por ke estu Nutrado, Sekureco, Sano kaj Laboro por ĉiuj, en la formado de la Ekumena Civitano.*

Ekde 1994, LBV tenas partnerajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj (UN), pere de la Departemento pri Publika Informado (DPI). En 1999, ĝi fariĝis la unua brazila civila organizo, kiu akiris ĉe UN la statuson de ĝenerala konsulto en la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro (Ekosok).


La laboron de LBV oni plenumas, per sendependaj sidejoj, en sep landoj (Argentino, Bolivio, Brazilio, Paragvajo, Portugalio, Urugvajo kaj Usono).

LBV, ekde de sia fondiĝo, apogas Esperanton per ĉiaj disponeblaj rimedoj, tiel efektivigante unu el siaj celoj: *“Batali por la plej granda disvastigado de la internacia lingvo Esperanto, altvalora ilo por la interfratiĝo de la popoloj, laŭ la konsidero ke LBV estas la Esperanto de la religioj, samkiel Esperanto estas la LBV de la lingvoj”*. Kreita en la 1960-aj jaroj, la Departemento de Esperanto de LBV celas disvastigi ĝian ekumenan mesaĝon al ĉiuj, uzante por efektivigi tion la internacian idiomon kiel pova ilo de unuigo. De tiam oni tradukas plurajn publikigaĵojn, kiel ekumenajn preĝojn, literaturajn tekstojn, revuojn, gazetojn, faldfoliojn, librojn por infanoj, k.a. La uzado de Esperanto ankaŭ okazas en la Templo de Bona Volo (TBV), la Templo de Paco, fondita de Paiva Netto, kaj akklamita de la popolo kiel unu el la sep mirindaĵoj de la ĉefurbo de Brazilio. La Ekumena Piramido de LBV – kiel ĝi ankaŭ estas konata ekde sia inaŭguro (la 21-an de oktobro 1989) – jam proksimume ricevis 20

milionojn da vizitantoj kaj pilgrimantoj el pluraj landoj. TBV situas ĉe SGAS 915, Lotes 75/76, en Brazilo/DF, Brazilo.

Vizitu la retejon www.bonavolo.com kaj konu la agadon de LBV plenumatan en Brazilo kaj en la mondo!

Albanio



Bradhyl Selimi

Profesoro

Iu profesoro de matematiko diris al siaj du studentoj tre promesantaj kaj talentulaj, Paŭlo kaj Stefano:

"Nun mi pensas du naturajn ciferojn x kaj y , kies sumo estas maksimume 100, dum $1 < x < y$

Al vi, Paul mi sciigas kaŝe la produkton de x kun y .

Dum al vi Stefano mi sciigas same kaŝe ties sumon.

Nun klopedu, ĉiu el vi, konkludi pri x kaj y . Komprenoble, ne diru unu al la alia tion kiun mi sufleris al vi, aparte."

Kaj, dum longa tempo de intensa meditado, ambaŭ studentoj ne interŝanĝis informaĵojn pri la produkto kaj sumo de nekonataj ciferoj. Poste, ekis mistera dialogo:

Paŭlo: Ne, mi ne povas trovi x kaj y .

Stefano: Ho, tion mi jam sciis.

Paŭlo (surprizita kaj post iom da meditado): Tamen mi jam trovis x kaj y .

Stefano (same): Ankaŭ mi jam trovis x kaj y .

Kaj ili pravis. Kiun paron $(x ; y)$ ili jam trovis?

Noto: Nur unu paro $(x ; y)$ koincidas al ilia dialogo!

Solvo

Estas du naturaj ciferoj, diversaj unu de la alia kaj ĉiu pli granda ol 1, tiaj ke ilia sumo ne transas 100. Certe, pli da informojn disponas Paŭlo kiu jam konas la produkton de x kaj y . Ĉar li devas trovi ĉiujn divizorojn de la produkto kaj esplori ilin por ke kontrolu se multiplikinte po duope ili rezultigu la donitan produkton. Ĉi kaze se ekzistas nur unu duopo tia, ĝuste tio estus la solvo. Certe tio okazus se la duopo konsistus el primoj.

Devas okazinta tiel ke Paŭlo diris ke li jam divenis la solvon. Tiu diraĵo igis Stefanon trovi la paron, ĉar li jam pretigis ĉiujn parojn kies sumon li jam sciis. Sed dum ĉi paroj donas diversajn produktojn, li devus fari tion por ĉiu produkto, kiel faris Paŭlo.

Ni prikonsideru la numerojn 11 kaj 17. Ilia produkto estas 187, kaj Paŭlo post kiam obligis trovis nur du ciferojn, 11 kaj 17. kaj diras ke li trovis la solvon. Dum Stefano konas ilian

sumon, sed nur unu paro konsistas el primoj. Kiam Paŭlo diris ke li trovis la solvon, tiam ankaŭ Stefano haltis ĉe la paro (11, 17)

Bardhyl Selimi

Ĉeĥujo **Jaroslav Krolupper** **Esperanta kato**

En pensiono ESPERO en Skokovy, ĉarma vilaĝo proksime de „Bohemia paradizo“, belega regiono de Ĉeĥa respubliko, oni jam multajn jarojn aranĝas esperantajn kursojn. Ankaŭ mi en tiuj kursoj kelkfoje partoprenis. Mia lasta vizito restos enskribita en mia memoro por ĉiam. Mi travivis tie ĉe unu posttagmeza promeno okazaĵon, kiu estas tre grava por studo de disvastigado de Esperanto. Ĉar tie manifestiĝis **scipovo de Esperanto mem disvatiĝadi !**

Kio okazis: Promenante, mi ekvidis sur herbejo subitan rapidan movon de nigra-blanka korpo. Ĝi aperis kaj ree malaperis. Mi rigardis la lokon pli atente kaj vidis katon, kaptantan muson. Mi amike demandis ĝin (kompreneble en la ĉeĥa): „*Tak co, chytilas?*“ La kato ignoris min. Mi ripetis la demandon kaj la kato denove min ignoris. Jen venis en mian cerbon ideo alparoli la katon esperante. Mi vokis al ĝi: „Ĉu vi kaptis?“ Kaj la kato iomete leviĝis, turnis la kapon al mi kaj per piedo antaŭ la buŝo mansignis: „Silentu!“ Poste ĝi ree tuŝkuŝiĝis sur teron kaj kaŭriĝis, atendente muson.

Mi ne sukcesis malkovri, kiamaniere efektiviĝis ĉi tiu miraklo. Certe gravas la longtempa regula ripetado de esperantaj kursoj. Helpas eble ankaŭ la nutura beleco de la regiono. Mi nepre ĉe mia venonta vizito en Skokovy alparolos esperante iun el ĉevaloj, kiuj tie paŝtiĝadas. Mi certe sukcesos. Bestoj estas ofte pli saĝaj ol homoj.

/La aŭtoro de esperanta teksto estas Jaroslav Krolupper, la sendinto estis: s-ino Jindřiška Drahotová/

Aŭstralio **Rekompeco**

Virino perdis sian mansakon. Feliĉe ĝi troviĝis de honesta eta knabo kiu redonis ĝin al ŝi. Priserĉante la monujon, ŝi diris, - "Estas strange.

Kiam mi perdis mian sakon, mi certis ke enestis nur \$100 bileto en ĝi.

Nun estas kvin \$20 biletoj."

"Prave, Sinjorino,"- diris la knabo. - "Lastafoje kiam mi trovis monujon de virino, ŝi ne havis malgrandajn monbiletojn por rekompenci al mi."

/De: Dave Rutan - esperantigis kaj sendis: Sandor Monostori: Aŭstralio/

Usono-Hungario

Julio Baghy **Ran-kvarteto**

Dediĉata al la plendantaj nenifarantoj

Sub tegmento staris kuvo

dum somera densa pluvo,

sed tegmento baris pluvon,
pluvo falis apud kuvon,
ĉar el pluvo kuv' ne havis,
pro l' soifo ranoj kvakis:

Kvavak kvavak kvak-kvak'
akva kuvo, akva kavo
kvak kvak kvak
kvakas ni al Akvoavo
kvak kvak kvak
kvar kvakantoj kvardekvoĉe
kvartet-kvakas plenriproĉe
pro mankhav' de l' kava kuvo
en la akvokuv' sen pluvo
kvak kvak kvak!!!!

Kvavak kvavak kvak kvak
kava kuvo vane vakas
kvak kvak kvak
kvankam ni por pluvo kvakas
kvak kvak kvak
kvodlibet' de hor' kvakanta
en la kuva kav' kvakanta
kvakas kvere: Akvoavo,
akvon al la kuvokavo
kvak kvak kvak!!!!

Tio pravas, se dum pluvo
staras sub tegment' la kuvo,
ranoj vane kvaki povas,
se je salto sin ne movas.
Do ne kvaku kiel ranoj,
karaj gesamideanoj!

(Pilgrimo, Budapest, 1926 /Boris Kolker: Vojaĝo en Esperanto-Lando / OIK:”Fajszikolektaĵo.”Budapeŝto, Hungario/

Rumanio – Oradea

“ Saluton estimataj geamikoj!

Ni informas vin, ke okaze de la **Centjariĝo de la Oradea Esperanto Asocio**, festa kunveno okazos inter **la 7-an kaj 9-an de majo 2010**. La kunvenejo estos en la

Reformita Kultura Centro Lorántffy Zsuzsanna,

sur **Piața Libertății n-ro 28,**
tute proksime de la urbocentro.

Sendinto: Attila Makay<amakay38@rdslink.ro>”

La Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos” gratulas ĉi okaze, kaj deziras ankoraŭ multoblajn cent jarojn por la Esperanto-Klubo de Oradea. Nome de la amikrondanoj: Geedzoi Pásztor



Ni funebras

Forpasis

D-ro Ferenc Jáki

16. 11. 1919--26. 03. 2010



(La portreto estas farita de Veronika Dobrán, 18-jara esperantistino, dum la pasintjara Zamenhof-Festo.)

La malĝojigan informon sciigis Szilvia Jáki, edzino de la filo de D-ro Ferenc Jáki. matene, kiam la familio iris al li, li jam ne estis vivanta. Li vivis sola post la morto de D-ino Marianna Legányi, lia dua edzino. Ĝis la plej lasta minuto li konservis sian sanan cerbon kaj esperantistecon.

Forpasis

D-ro Ferenc Jáki,

dumviva membro de HEA kaj UEA,

16. 11. 1919--26. 03. 2010.

Li naskiĝis la 16-an de novembro 1919. en vilaĝo Érd-Ófalu. Li vizitis la gimnazion en urbo Székesfehérvár. Post la maturiga ekzameno li studis teologion kaj filozofion. Li iĝis diplomita mezlerneja profesoro pri la hungaraj kaj latinaj lingvoj kaj literaturoj, kaj li doktoriĝis pri la latina lingvo. Kiel monaĥo li instruis ĝis 1948, kiam pro la reĝimo de Rákosi li devis forlasi la ordenon. Li ricevis la papan forpemeson. Li laboris en diversaj lokoj kiel helplaboristo. Li edziĝis, li havis du filojn. Fine li ekinstruis en gimnazio. La diplomon pri Esperanto-profesoreco li ricevis en 1965. Li ĵetis sin inter la miraklojn de la nove akirita lingvo. Li verkis artikolojn, prelegis en diversaj lokoj pri la plej diversaj temoj, kiuj respegulis lian vastan terenon de interesiĝo. Per Esperanto li vizitis tutan Eŭropon, kaj li partoprenis ankaŭ la Pekinan UK-on. Ekde la printempo de 1966 ĝis la printempo de 1969 ankaŭ li (kune kun S-ro József Cziboly, S-ino Éva Farkas-Tatár, S-ro Ervin Fenyvesi, Alfonz Pehan kaj Ludoviko Tárkony) partoprenis la ĉiutagan laboron (tradukadon kaj laŭtleĝon de novaĵoj) de la Esperanto-Sekcio de Hungara Radio. (Ĉiuvespere je la 20-a horo 30 minutoj eksonis: "Bonan vesperon, Karaj Aŭskultantoj! Ĉi tie parolas Buapeŝt en Esperanto. Post la politikaj novaĵoj sekvis kulturaj aktualaĵoj, kaj en la lastaj 5 minutoj disaŭdigis Esperantaj informoj sendepende de Hungara Esperanto-Asocio.) Li aktivis ekde 1966 ĝis 2008 en la Esperanto-Ekzamenkomisiono de la Ŝtataj (poste Ŝtate Rekonataj) Ekzamenoj. Li estis elektita Dumviva Membro de Hungaria

Esperanto-Asocio kaj tiu de Universala Esperanto-Asocio. Ekde 1999 li estas Kavaliro de la Hungara Kulturo. Kiel pensiulo li aperis en 1979 en la vivo de Unuigxo de Amikoj de Artoj. Malfermante ekspoziciojn li prezentis pli ol 150 kulturhistoriajn prelegojn. El siaj lingnoskulptaĵo, grafikaĵoj, pastelbildoj, silkobildoj kaj artaj fotoj li aranĝis multe da memstaraj ekspozicioj en Budapeŝto, en kaj ekster Hungario. En la ekspozicioj li deklamis siajn proprajn poemojn en du lingvoj. Liaj poemvolumoj aperintaj inter 1988 kaj 1998 estas: Gesztenyevirágok őszi verőfényben ('Kastanfloroj en autuna Plenumo'), Fecskefészek-csillagszóró, ('Hirundonesto-stelsutilo') Legindaj legaĵoj (hungara-Esperanta poemaro), iustrita poemaro Kódexversek ('Kodekspoemoj'), Naptár avagy Kalendárium ('Tagaro au Kalendaro' -- historio de la tempomezurado kaj -kalkulado). Dek kulturhistoriaj artikoloj en la Jarlibroj de Fűles (enigmogazeto por hungaroj), plejparte pri Esperanto, inter 1970-85. Li regule partoprenis la talentotrejnadon en verkistaj tendaroj, kaj li ricevis elstarajn distingojn pro siaj literaturajxoj. Tamen li pleje gojis, ke liaj poemoj regule aperis en VITA ('Diskuto'), gazeto de gimnazio Pál Szinyei Merse. Okaze de lia 80-a naskiĝdatreveno ili pulikigis longan artikolon pri lia profesora kaj literatura agado. Ankaŭ la naskiĝurbo renkontiĝis kun sia reveninta filo en varmakora festo. Laŭ lia kredo eblas eviti la spiritan indiferentiĝon. Lia slogano estis: „Dum la plugfero plugas, ĝi restos brila, eĉ se dume ĝi uzigas, tamen ĝi flankmetita rustiĝas, eĉ se freŝnova!”

Kaj la lasta dato de lia vivo: la 26-a de marto 2010. La adiaŭa ceremonio de onklo Feri okazos la 10-an de aprilo (sabate) je la 11-a horo en la romkatolika preĝejo Sankta Miĥaelo en Érd-Ófalu. Ĉe speciala memorloko oni povos meti malgrandajn florkronojn, prefere opajn florojn aŭ malgrandajn florbukedojn. La tombo de la cindroj estos Danubo -- ĉe iu malgranda insulo estos disĵetitaj la cindroj en la akvon de Danubo. Viajn kondolencajn mesĝojn akceptas HEA <hungario@gmail.com> Ili estos transsenditaj al la funebranta familio. Flamigu kandelon, preĝu por li, sed almenaŭ haltu por momento en la laboro. Ni memoru pri li!

Consummatum est.

Kondolenco atingita nian redakcejon: de familianoj de la mortinto

Funebrante: Imre Szabó - prezidanto de HEA

Kondolenco

” Bonvolu akcepti kondolencan de mi, Renato Corsetti, kiu nur malofte kaj laŭokaze havis la plezuron rilati kun li. En tiuj malmultaj okazoj mi povis rimarki lian seriozecon al Esperanto kaj lian afablecon personan.

La Esperanto-movado estas pli malriĉa.

Bedaŭre

Renato Corsetti”

„Koran dankon, la informojn senditaj de vi. Ni publikigos en retejoj:

(http://www.espero.com.cn/se/node_25021.htm) , kaj viaj peton au leteron ---- en

(http://www.espero.com.cn/se/node_25003.htm) .

elpc@china.com”

Ferenc Jáki: Paradoksoj

Violon' estas nur seka ligno kun kelkaj kordoj,
sed al Mondo alia nin altigas Melodioj.
Laŭ Sciencul' la muziko estas nur oscilado,
frekvenco, sed por mi pli: Simfonio-flugado.
Sonoras Odo de Ĝojo: Ĝi centoble valoras,
ol frekvencado, ĉar en Ĝi mia Viv' sonoras!

Mortis Klara Mikola naskito de Norda-Hungarujo



Ŝi naskiĝis la 29-an de januaro **1963** en urbo Ózd kiel tria infano de Béla Mikola, inĝeniero kaj Piroska Petrozsenyi, agronomo. La familio translokiĝis al Nyiregyháza en 1966, pli malfrue en 1968 al Szekszárd. Klareto komencis la bazlernejon en Szekszárd en 1969 kaj en 1972 la „Liszt Ferenc” muziklernejon, kie lernis fakon klarneton. Ŝi kaj ŝiaj pli aĝaj fratoj muzikis en la urba blovorkestro.

Ŝi enskribiĝis en 1977 al „Garay János” gimnazio de Szekszárd.

En 1978 la familio retranslokiĝis al Ózd. Klareto tie daŭrigis siajn studadojn en la „József Attila” Gimnazio kaj en „Erkel Ferenc” Muziklernejo ĝis 1981.

Post abiturenta ekzameno ŝi ekstudis la instruistan fakon por instrui kanton,- kaj muzikan lernobjektojn en dumtaga sekcio de „Bessenyei György” Pedagogia Altlernejo. Dume ŝi ekinteresiĝis kun Internacia Lingvo Esperanto kaj komunumo de la geesperantistoj.

Ŝi edziĝis en 1984 kun Gabrielo Mezei.

En 1986 ŝi spertis helpe de sia tragedio efikon de la naturmedia damaĝo.

En aŭgusto naskiĝis sia filo, Ákos, kiun oni devis operacii pro iu evolua anomalio, kiu post la operacio en lia unujaraĝo mortis. /oficiale oni ne pruvis la interrilaton pri la katastrofo de Ĉernobil, sed ankaŭ aliaj havis tiun ĉi problemon, pro tio ankaŭ ni pensas tion same./

Ĉi tiu problemo instigis Klareton por iĝi konscia kaj konsekvenca medioprotektantulino.

Ŝi ricevis instruistan diplomon en 1987. Ŝi translokiĝis al Budapeŝto kaj ekde tio aktive partoprenis la naturprotektadan, medioprotektadan, bestoprotektadan kaj urboprotektatan laborojn. Ŝiaj skribaĵoj aperis en revuo „Kagylókört”. Pli malfrue de 1991 ŝi estis redaktoro de revuo „Lélekzet” de Aero-Laborgrupo, pli malfrue iĝis ĝia ĉefredaktoro.

Ŝi agadis ĉiam pli intenzive en la Esperanto-komunumo.

En 1989 ŝi faris supergradan ekzamenon el internacia lingvo Esperanto.

Ŝi en 1989 eksedziniĝis de sia unua edzo kaj studis en „Eötvös Lóránd” Sciencuniversitato, en fako Esperanto en Budapeŝto.

En la universitato ŝi akiris mezlernejan instruistan diplomon por instrui la esperantan lingvon kaj literaturon.

Ŝi kaj László Garamvölgyi eldonis kanton de esperantlingvaj kantoj.

En 1997 ŝi edziniĝis al László Dóczy. Tiu geedzeco ne estis sukcesa kaj post unu jaro ili eksedziĝis.

Inter jaroj 2002-2006 ŝi kaj Stefano Tepliczky, astronomo redaktis kaj gvidis programon „Zöldindulás” de la Radio Fiks.

Inter la jaroj 2003-2006 ŝi daŭrigis muzikterapiistajn studojn en „Bárczy Gusztáv” Kuracpedagogia Fakultato de “Eötvös Lóránd” Scienca Universitato. Tie ŝi ricevis muzikterapiistan diplomon.

Ŝi estis kuratora prezidanto de la Fondaĵo „Természetesen” /Nature./ La fondaĵon oni kreis en la jaro 2004-a. Tiu fondaĵo eldonis revuon „Másképp” /Aliel/. La revuo aperas po kvaronjaro.

En novembro de 2008 oni elektis ŝin al estrarano de Hungaria Esperanto- Asocio.

En 2009 ŝi okupiĝis pri lingvoinstruado kaj ekzameno, ĝis sia sano permesis.

En novembro de 2009 ŝi devis iri en hospitalon.

La 7-an de februaro 2010-a ŝi mortis.

/Biografion de Klara Mikola, sendita de sia frato Petro Mikola, esperantigis László Pásztor/



Klara Mikola
1963-2010

Klareton la asembleo de HEA elektis estrarano la 15-an de novembro 2009. Dum multaj jaroj ŝi instruis, ekzamenis kaj estis aktiva ano de Esperantujo. Ŝiaj gitarmuziko kaj kantado ĉiam fascinis la ĉeestantojn. Ŝi estis ĉiam kara, komprenema personeco. Kvankam post la vivo sekviĝas la morto, sed kiam iu juna parenco, amiko mortas, tiam ne povas akcepti, kompreni malfacile la morton. Klareto Mikola kiel medioprotektanto **verkis** plurajn rakontojn. Tiuj ĉi estas atingeblaj laŭ la subaj:

<http://zold.virtus.hu/?=detailed> article&aid=86517

Tie estas trovebla apud la rememorigo ankaŭ ŝia alia rakonto:

<http://www.greenfo.hu/hirek/hirek> item.php?hir=23592

Ni aranĝis rememoron la 4-an de marto 2010, je la 17-a horo en Budapeŝto en la Domo de la Nacioj pri samideanino Klareto. Pri la rememoro la subaj fotoj pretiĝis de la HEA

Ripozu en paco, Klareto!

Funebre kaj dolore!

Ferenc Harnyos - Jozefo Eszényi
estraranoj de HEA

La sekvaj bildoj estis fotitaj okaze de la adiaŭa kunveno de HEA. La ĉeestantoj estis familianoj de Klareto kaj estraro de HEA. La fotojn sendis: Imre Szabó kaj Ferenc Harnyos.

Nome de la membraro de Esperanto-Amika Rondo “Király Lajos” , ni kondolencas al familianoj de la mortintoj kaj al estraro de HEA, pro forpasoj de la neforgeblaj d-ro Ferenc Jáki kaj s-ino Klara Mikola: Ili ne estas anstataŭigeblaj, ilian mankon ni forte sentos. Ripozu ili pace. Ilian memoron ni gardos.

Funebrante:

Geedzoj Pásztor



Je memoro de niaj karegaj mortintoj!

Pasko

Nun, rememore pri okazo de la jam pasinta eklezia festo ni proponas en vian atenton la suban historion.

Dia helpo

En iu vilaĝo estas inundo. Iu homo fuĝas sur supron de sia domo. La akvo atingis duonaltecon de la domo kaj en tiu momento alvenis al la domo iu boato. La konatuloj kriadas al li:

- Venu, enboatiĝu al ni!
- Mi ne enboatiĝu.....-li diras.
- Sed venu, ĉar la inundo forportas vian domon!
- Baldaŭ Dio helpos.

La boato foriras. La nivelo de la akvo leviĝas, la domo ruiniĝadas. Denove aperas la boato.

La homoj denove vokas lin:

- Venu, enboatiĝu al ni, ni helpas vin kaj savigos.
- Mi ne iras.
- Via domo tuj ruiniĝas, vi falas en la akvon kaj dronas en la akvo!
- Baldaŭ Dio helpos

La boato foriris.

La nivelo de la akvo leviĝis, la domo ruiniĝis, la homo enfalis akvon kaj dronis.

La animo de la homo atingis Dion. Dio demandis tiun:

- Kial vi ne enboatiĝis?
- Ĉar mi atendis vian helpon.
- Mia filo, mi sendis al vi boaton dufoje.....

Esperantigis: László Pásztor

Sándor Petőfi: Vi amas la printempon

Vi amas la printempon,
Aŭtunan tempon mi.
Similas mi aŭtunon,
Kaj la printempon vi.

Vizaĝo via ruĝa
Printempa rozflori?
Rigardo mia laca:
Aŭtuna suradi!

Se mi antaŭen solan
Ekpaŝon farus jam,
Mi sur la frosta sojlo
De l' vintro starus jam.

Sed se repaŝus mi kaj
Antaŭen saltus vi,

Jen, en la bela, varma
Somero haltus ni.

Esperantigis: D-ro Kálmán Kalocsay

Ĉi numeron de nia revuo reviziis el Ĉeĥio: s-ino Jindřiška Drahotová, el Hungario: s-ino Anna Besenyei, sinjoroj: d-ro Iván Bujdosó, Jozefo Cziboly kaj d-ro Imre Ferenczy.

Ni deziras diobenon al niaj estimataj legantoj, sed al ĉiu: laŭ sia propra kredo!



Nan-migdalo - Píngyom
/Fotis: s-ino Adri Pásztor/



NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Tel.: +36 46 738 982

Retpošto: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.uw.hu/>
<http://radiocool.tisser.hu>